



Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2005, numero 1-a: januaro / marto
kun informoj pri renkontoj ekde la 1-a de aprilo



La 3-an de decembro 2004 mortis en Genève Madeleine Stakian-Vuille, honora membro de SES. Naskita en La Chaux-de-Fonds la 15-an de februaro 1910 ŝi familie migris al Genève, kie ŝi esperantiĝis en 1928. Jen ŝia portreto, kiam baldaŭ poste ŝi ekverkis sub la plumnomo Mad Mevo.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio:

Claude Gacond, Poŝtfolio 3034,
CDELI, Biblioteko de la Urbo,
2303 La Chaux-de-Fonds.

Retpoŝto: claud.gacond@ne.ch

Tel.: ĉe CDELI: 032 967 68 55,
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29:
indiki: por Claude Gacond

Redaktaj kunlaborantoj:

Rolf Ernst, Nancy Fontannaz, Andy
Künzli, Richard Schneller.

SES informas

Redaktaj datlimoj por la venonta jaro

2005-2: aprilo-majo: marte 30. Mencio de informoj ekde la 10-a de aprilo.

2005-3: junio-aŭgusto: maje 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de junio.

2005-4: septembro-oktobro: aŭguste 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de septembro.

2005-5: novembro-decembro: oktobre 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de novembro.

SES-estraro

Bruno Graf, prezidanto, Jurastrasse 23,
3063 Ittigen/Bern. Tel.: 031 921 44 59.
Retpoŝto: bgraf.o@bluewin.ch

Dietrich Weidmann, vicprezidanto,
PF 301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.
Retpoŝto: info@esperanto.ch

Mireille Grosjean, vic-prezidanto, Grand-
Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18
88. Retpoŝto: mireille.grosjean@rpn.ch

Nicole Margot, sekretario, Chemin des Lys
4, 1010 Lausanne. Tel.: 021 653 14 67.
Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch

Hans-Werner Grossmann, kasisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132 MuttENZ 1.
Tel.: 076 460 8992. Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

kun ricevado de *SES informas*.

fr.10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
fr. 50	Paroj	"
fr. 70	Patronoj	"
fr. 25	nura abono al	<i>SES informas</i>



Svisa kalendaro

Aprile

- 4: Lausanne: ESL: Kunveno kun F. Randin.
5: Genève: Stelo: Lumbilde prelegas A. Altherr.
6: Luzern: LES: Kunveno kun A. Dettling.
16: Zürich: Ĝenerala Jara Kunveno de SES.
23-24: Chaux-de-Fds: KCE: Lingva ekonomiko.
27-maje 1: Genève: Stelo: Libro-Foiro.
28: Basel: ESB: Surpriza kunveno.

Maje

- 2 : Lausanne: ESL: Kunveno kun Vahid pri Irano
3: Genève: Stelo: Filmo Lekanto en Pekino.
4: Luzern: LES: Konversacia rondo.
15: Redakta datlimo de SES informas.
21: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
26: Basel: ESB: Invito ĉe Berthe Spalinger.
28-29: Chaux-de-Fds: KCE: 25 jaroj de LF-koop.

Junie

- 1: Luzern: LES: La Brünig-fervojo.
2: Lausanne: LES: Vahid parolas pri Irano.
18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
23: Basel: ESB : Minigolfa kunveno.
24-29: Chaux-de-Fonds: KCE : PEN-klubo.

Julie

- 6: Luzern: LES: Konversacia rondo.
9 : Luzern: LES: Ekskurso al Seebodenalp.
11-15: Grindelwald: KCE, Naturamika Semajno.
20-23: Vilno: Kongreso de IKEK.
23-30: Vilno: 90-a Universala Kongreso.
26-31: Chaux-de-Fonds: KCE: progresiga kaj perfektiga kursoj de esperanto.

Aŭguste

- 3-7 & 9-13: Chaux-de-Fds: KCE: Esperantologia fakultato kun Duncan Charters, Giorgio Silber kaj Usui Hiroyuki.

- 15: Redakta datlimo de SES informas.
21: Tegerfelden: ESB : Vizito de la Vinmuzeo.

Septembre

- 3: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
5: Lausanne: LES: Kunveno.
7: Luzern: LES: Konversacia rondo.
9: Basel: ESB: Invito ĉe Nicole Béroud-Focke.

OktoBRE

- 1: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
3: Lausanne: LES: Kunveno.
5: Luzern: LES: Universala Kongreso.
15: Redakta datlimo de SES informas.
22: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
27: Basel: ESB: Ĉiu rakontas pri siaj ferioj.

Novembre

- 2: Luzern: LES: Konversacia rondo.
5: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
7: Lausanne: LES: Kunveno.
15: Redakta datlimo de SES informas.
19: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
24: Basel: ESB: Programo 2006.

Decembre

- 3: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
7: Luzern: LES: Zamenhof kaj programo 2006.
10: Basel: ESB: Zamenhofa festo, ESB 100-jara.
15: Redakta datlimo de SES informas.

2006 Januare

- 4: Luzern: LES: Konversacia rondo.

-oOo-

Vivo de SES

SES-Tago en Zuriko

(sojle al la 100jara jubileo de ESZ)

Sabaton, la 16-an de aprilo 2005

**en la Esperantejo – Akazienstrasse 6 –
Zuriko-Seefeld**

Trajne al Zuriko-Stadelhofen aŭ per tramo 2 kaj 4 ĝis haltejo
Stadelhofen.

(Mapo troveblas sub www.esperanto.ch/mapo.html)

Programo

09.30 – 10.30	Bonveniga aperitivo, kafejo kaj librovendejo malfermitaj
10.30 – 13.00	Ĝenerala kunsido de SES
13.00 – 14.00	Tagmanĝo
14.30 – 15.30	Prelego pri ĉina ŝakludo. Preleganto: Beno Frauchiger de Bazelo
15.30 – 16.30	Librejo kaj kafejo malfermita (vendado de libroj, kafo, kukoj ktp.)
16.30 – 17.45	Prelego pri Feng Ŝui. Prelego kun multmedi-prezentaĵo. Preleganto: Rolf Ernst de Zurich.
18.00 – 20.00	Komuna vespermanĝo

20.00 – 21.30

Arta kaj distra programo, la vespero staras sub la moto “100 jaroj Esperanto en Zuriko” ĉar en aprilo 1905 ekestis la plano fondi Esperanto-Societon Zuriko, kio realiĝis la 20-an de decembro 1905.

21.00 ĝis la lasta iris:

Lasta ebleco akiri librojn, adiaŭado

Kotizoj en svisaj frankoj:

Kategorio:	A	B	C	Ĉ	D
Ĝenerala kunsido	-	0.-	-	0	0.-
Programpartopreno	20.-	15.-	12.-	10.-	5.-
Tagmanĝo	20.-	15.-	12.-	10.-	8.-
Vespermanĝo	25.-	20.-	15.-	12.-	10.-
Pakaĵo	60.-	45.-	34.-	27.-	18.-

A = Plenkreskuloj kun normala salajro

B = Plenkreskuloj kun normala salajro, membroj de SES aŭ ESZ

C = Junuloj ĝis 25 jaroj aŭ personoj sen salajro

Ĉ = Junuloj ĝis 25 jaroj aŭ personoj sen salajro, membroj de SES aŭ ESZ

D = Infanoj ĝis 16 en akompano de gepatroj aŭ respondeca persono

(Aliĝu skribe al: Esperanto-Societo Zuriko, PF 858, 8034 Zuriko, aŭ fakse sub +41(0)44 261 04 79, telefone dum oficejhoroj sub +41(0)44 251 50 25, aŭ rete: nelida@esperanto.ch)

✂ Aliĝilo: (fotokopiebla aŭ eltranĉebla)

Mi aliĝas en la kategorio ___ por la ___ tuta pakaĵo, ___ ĝenerala kunsido, ___ programo, ___ tagmanĝo, ___ vespermanĝo

Familia nomo: _____ Persona nomo: _____

Strato kaj n-ro: _____ Adresaldono: _____

Poŝtkodo/urbo: _____ Lando: _____

Telefono: _____ Retadreso: _____ @ _____

Per mia subskribo mi definitive aliĝas kaj devigas min pagi la kotizon de CHF _____ al la poŝtkonto de **Amikaro Esperantista**, 8034 Zuriko, Poŝtkonto: 90-12622-6

Tagordo

de la ĝenerala Kunveno

16-an de aprilo, 10h30-13h00

1. Komunikoj de la prezidanto.
2. Elekto de la voĉnombrantoj.
3. Protokolo de la lastjara kunveno, aperinta en "SES informas" 2004-3 (nelaŭtlegeta).
4. Jarraporto 2004, jarkalkulo, bilanco, raporto de la revizoroj.
5. Agado kaj buĝeto 2005.
6. Honorigo de membroj.
7. Diversaĵoj.

-oOo-

Jarraporto 2004

Landa asocio plenumas taskojn sur nacia tavolo, ekzemple kontakti svisajn instancojn, informi la gazeton, krei favorajn kondiĉojn por esperanto. Same grave estas subteni lokajn grupojn kaj membrojn, disponigi materialon por la varbado, fortikigi la koherecon per agado kaj informado.

La estraro, la motoro de la asocio, diskutis kaj solvis la problemojn perrete. La reciprokaj rilatoj estas bonaj, spite de

diferencaj opinioj. Ni laboras honorofice, kio signifas, ke la gvidado dependas de la bonvolo de la estraranoj. Depost iom da tempo Chiara Fabbri, nia itallingva peranto, deziris retiriĝi. Vole-nevole ni devas akcepti tiun deziron kaj adiaŭas ŝin kun kora danko pro la afabla kunhelpo.

La membraro restas longjare fidela al nia societo. La kasisto ellaboris denove statistikon pri la membrara stato, kiu estas stabila, kvankam membroj mortas kaj eksigās. Finjare SES havis 154 membrojn kaj 22 abonantojn de la bulteno *SES informas*. Eliris 26 personoj pro morto aŭ nepago de la kotizo, sed surprizas, ke eniris 27 novuloj tiel, ke regas ekvilibro. La redaktoro kaj la kasisto multe kontribuis al tiu rezulto. Rimarkindas, ke ni havas 14 patronojn, kiuj pagis duoblan kotizon, kaj ankaŭ ke ni ricevis 70 donacojn, inter ili heredaĵon de 4'000 fr.

La informado estas ege grava, la interna kaj la ekstera. Nia informilo *SES informas* aperis nur kvarfoje. La redaktoro devis rezigni pri la kvina numero pro la translokiĝo de CDELI al alia salono de la urba biblioteko. Claude Gacond estas ĉionfaranto. Li ne nur redaktas, sed ankaŭ kopias kaj dissendas la

bultenon. Ni devus malŝarĝi lin kaj trovi presiston, sed la kostoj mult-iĝus. Kiu havas solvon?

Denove Mireille Grosjean verkis kaj dissendis tri dosierojn al franc-lingvaj gazetoj kaj personecoj. Ŝi komentis interesajn rezoluciojn, prezentis biografiojn de svisaj esperantistoj, klarigis gramatikajn elementojn kaj strukturojn de esperanto, atentigis pri la hegemonio de la angla, postulis justan lingvopolitikon. La tekstoj ofte provokas kaj vekas intereson pro la originaleco.

Mireille Grosjean kaj Nicole Margot komencis politikan lobiadon. Ili leteris al politikistoj, kiuj kritikis la uzadon de anglaj vortoj aŭ titoloj fare de federaciaj oficejoj aŭ entreprenoj. Tiuj intervenoj permesas atentigi pri lingva demokratio kaj trovi atenton por nia afero.

La jarkunveno, kiu okazis en la fora vilaĝo Les Brenets la 24-an de aprilo 2004, imponis pro la kultura kaj publika programo. La loka historiisto Pierre Deléglise komentis la ekspozicion pri la esperanto-pioniro Edouard Ducommun kune kun gelernantoj de *La Grande Ourse*. La komunuma prezidanto Gilbert Déhon inaŭguris la memorŝildon en impresa ceremonio. La ŝipveturado al Saut

du Doubs kaj la piedirado returnen estis vera plezuro. Ni dankas Claude Gacond kaj Mireille Grosjean pro la organizado.

Alia kunveno de SES okazis en Bern la 23-an de oktobro 2004. Komence Mireille Grosjean raportis pri la UK en Pekino kaj Nicole Margot pri la kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Bilbao. Posttagmeze Claude Piron kaptis ĉies intereson, rakontante vigle el sia verkista vivo.

Bedaŭrinda estas la malfondo de **Svisa Asocio de Esperanto-Fervojoj (SAEF)**. Kvankam esperanto bonege servas al fervojistoj, mankis nova generacio kaj ne plu eblis trovi membrojn por la estraro. Tiu fenomeno devus maltrankviligi nin, sed ni esperas kaj emas vidi nin en pli bona situacio, ol ni vere estas. Nu, la svisaj esperanto-fervojoj ne estas perditaj. Ili anas aŭ aktivas plu en la internacia fervojista fakorganizaĵo, certe ankaŭ en SES kaj UEA.

Bruno Graf, prezidanto de SES.

-oOo-

SES-Agado 2005

Jen koncize la celoj de SES :

1. Aktualigi kaj plibonigi la retejojn www.esperanto.ch kaj www.esperanto.to/ses.

2. Redakti kaj dissendi 3 gazetarajn komunikojn franc- kaj german-lingve.

3. Akceli kontaktojn kun publikaj kaj politikaj medioj.

4. Redakti kaj dissendi kvin numerojn de la bulteno *SES informas*.

5. Okazigi regionan kunvenon en aŭtuno.

6. Subteni lokajn grupojn kaj projektojn.

7. Ellabori la perkorespondan kurson en la germana lingvo.

8. Presigi kaj promocii la svisan enciklopedion.

Bruno Graf, prezidanto de SES.

-oOo-

Informado

Mendeblas franclingvaj informiloj pri esperanto.

Jam de kelkaj jaroj SES decidis subteni la informan taskon de la lokaj societoj liverante al ili naci-lingvajn informilojn. Ĉar la kosto pri eldonado de informiloj en la diversaj svisaj lingvoj estus ege

alta, ni decidis aĉeti tiujn informilojn al la najbaraj samlingvaj landoj. Tio ja funkcias por la germana lingvo, kaj ekde nun por la franca.

Jen kelkaj informiloj de Esperanto-France

Esperanto, le monde au bout de la langue, faldfolio por unua kontakto : po CHF 6.- por 100 pecoj.

Chaque langue meurt, c'est une culture qui disparaît : po CHF 6.- por 100 pecoj.

Faldfolio pri la lingvaj rajtoj

Premier rendez-vous avec la langue internationale. Senpage.

Esperanto, mode d'emploi por interesata publiko : po CHF 0.30 por peco.

Mendeblas tiuj informiloj duonpreze ĉe:

Nicole Margot

Lys 4, 1010 Lausanne

tel: 021 653 14 67

<n.margot@bluewin.ch>

SES pagas la alian duonon. La fakturo estas pagebla al la poŝta konto de SES kun la send-elspezoj:

Poŝta ĉekokonto : 17-581908-4, Svisa Esperanto-Societo, 2300 La Chaux-de-Fonds.

Nicole Margot.

Bilanco - Jarkalkulo – Buĝeto

BILANCO 31.12.2004

N-ro	Konto	1.1.2004	31.12.2004
1010	Poŝtkonto	796.47	3'734.07
1011	Fiksa poŝtdepono	00.00	7'000.00
	Kuranta ŝparkonto CS-ZH-40	11'358.65	00.00
1030	WIR banko	12'348.25	34'985.70
1060	Prunto al KCE	15'000.00	15'000.00
	Kasobligacioj CS-ZH	15'000.00	00.00
1090	UEA konto sesa-v (Saldo: 214.25 je kurzo 1.56)	334.23	318.88
1100	Inventaro	1.00	1.00
1150	Bonhavo ĉe ESTV: Antaŭimposto	1'884.45	375.70
1300	Transaj aktivoj	120.00	89.00
	Sumo aktivoj	56'843.05	61'504.35
2000	Transaj pasivoj	685.00	667.00
2100	Kapitalo (inkl. pliensezoj de 4'701.30)	52'483.25	57'184.55
2400	AGADO 2003 (Rezervita kapitalo, nova saldo post repago de erare dum 2003 ricevitaj 512.00)	3'674.80	3'162.80
2410	AGADO 2005 (Rezervita kapitalo, inkl. 490.00 dum 2004 ricevitaj donacoj)		490.00
	Sumo pasivoj	56'843.05	61'504.35

JARKALKULO		2004	Buĝeto 2004	Buĝeto 2005
3000	Informado, varbado	2'966.35	5'000.00	5'000.00
3010	Omaĝoj, laborrimedoj	352.90	100.00	200.00
3020	Subvencioj, premioj, projektoj	1'606.95	1'000.00	1'000.00
3110	SES informas elspezoj	1'952.90	2'500.00	2'500.00
3120	Kunvenoj kaj kunsidoj (ĜK, estrara, regionaj)	720.35	600.00	700.00
3150	Abono al revuoj	235.00	150.00	100.00
3200	Kotizoj al UEA, EEU, ktp.	168.30	150.00	300.00
3210	Administrado (afrankoj, telefonkostoj, ktp)	408.90	500.00	200.00
3220	Bank- kaj poŝtspezoj	198.35	300.00	500.00
3230	Donaco al KCE	450.00	450.00	450.00
3240	Redaktado perkoresponda kurso germanlingve	00.00	2'500.00	2'500.00
3500	Diversaĵoj		300.00	300.00
	Sumo elspezoj	9'060.00	13'550.00	13'750.00
4200	Membrokotizoj	4'980.00	4'300.00	5'000.00
4210	Abono al SESi sen membreco	530.00	500.00	800.00
4300	Donacoj, heredaĵoj	6'142.95	3'000.00	3'000.00
4500	SES informas enspezoj	435.00	375.00	0.00
4600	Bank kaj poŝtinterzoj	1'523.35	1.260.00	1'500.00
4800	Diversaĵoj	150.00	0.00	0.00
	Sumo enspezoj	13'761.30	9'435.00	10'300.00
	Pliensezoj (+) / Plielspezoj (-)	+ 4'701.30		- 3'450.00

22.01.2005 / Hans-W. Grossmann, kasisto

Donacoj

Donacoj, kiuj estus devintaj registrigiti en nia neaperinta bulteno 2004-5:

al SES: Anonimulo: 100, Paula Bleichenbacher, Genève: 15; Tazio Carlevaro, Bellinzona: 20; Mireille Grosjean, Les Brenets: 35; Jean Rodolphe Laederach, Peseux: 20; Jean-Marc Leresche, Le Locle: 15; Jeanne Mamin, La Tour-de-Peilz: 20; Hans Meier, Basel: 5; Willy Nüesch, Bern: 15; Parzival, Biel: 20; Ary Stauffer, Solothurn: 25; Joëlle Vuillemin, Genève: 5. **Sume: 295.**

Agado 2003-2005: Gertrude Eggenberger, Winterthur: 30; Nancy Fontannaz, Pully: 50; Ruth & Bert-Joris Van Puijñbroeck-Walder, Winterthur: 30. **Sume: 110.**

Patronoj 2004: Pagis duoblan kotizon, kaj do estas Patrono 2004: Pierrette Blanchet.

Donacoj venintaj poste al SES: Anonimulo: 100; Traugott Rinaldo Aebi, Ittigen: 15; Lucien Dahan, Genève: 65; Elisabeth Eisenegger, Zürich: 15; Ernst Glättli, Brugg: 15; Rémy Grandjean, Fontainemelon: 20; Mireille Grosjean, Les Brenets: 45.20; Marguerite Jaccard-Besson, Rolle: 30; Jean-Rodolphe Laederach, Peseux: 5; Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-Peilz: 30; Jean-Marc Leresche, Le Locle: 65; Werner Reich, St. Gallen: 50; Dietrich Weidmann, Zürich: 75; Sume: 530.20.

Nome de SES la kasisto Hans-Werner Grossmann dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco kaj antaŭdankas pro la atento, kiun ĉiu alportos al la pagilo aldonita al la nuna bulteno.

-oOo-

Kiel mi venis al esperanto?

Jean-Marc Leresche

Tiu biografio pravas, ke semoj plantitaj en fekunda tero povas doni belegajn fruktojn eĉ post dek-ses jaroj!

Mi naskiĝis en Le Locle, kaj mi sekvis tie la bazan kaj mezan instruadon. En la fino de la okdekaj jaroj mi ekkonis sinjorinon Mireille Grosjean, kiu instruis al mi la germanan dum du jaroj. Ne estis

malofte, ke ŝi parolis pri esperanto dum la lecionoj, sed tiam mi ne opiniis, ke tiu lingvo povus esti utila; nur la angla estas internacia lingvo, mi certis. En tiu tempo mi lernis pli-malpli facile la francan, la anglan, la germanan, la latinan kaj la grekan (mi estis la sola lernanto de tiu antikva lingvo).



La rakonto povus halti tiel kaj la klopodoj de mia instruistino restus vanaj.

Sed kelkfoje la vivo turniĝas bone.

Preskaŭ dek-ses jaroj pli malfrue, en julio 2004, mi legis artikolon en la loka gazeto pri sinjorino Grosjean kaj ŝia venonta partopreno en la 89-a universala kongreso de esperanto en Pekino. Mi volis scii pli pri tiu lingvo. Kial? hodiaŭ ankoraŭ mi ne scias precize. Do mi serĉis interrete informojn pri la movado de la lingvo internacia. Kompreneble mi trovis multajn ligilojn (pli ol du milionojn); inter aliaj mi rimarkis la paĝaron de Lernu :

www.lernu.net

kiu proponas ne nur novaĵojn pri esperanto, sed ankaŭ kursojn senpagajn. Mi enskribiĝis kaj eklernis esperanton per kvar progresigaj kursoj, po unu horon ĉiutage. Post du monatoj (aŭ sesdeko da horoj) mi akiris « bonan » nivelon laŭ aliaj spertaj esperantistoj. Paralele mi ekkorespondadis tra la mondo kun aliaj uzantoj de Lernu :

Litovio, Hungario, Pollando, Francio, Belgio, Brazilo. Ankaŭ mi sukcesis perkorespondan kurson ĉe : **Esperanto-Jeunes** :

www.esperanto-jeunes.org

Mi ne forgesis rekontakti mian eksinstruistino por anonci al ŝi la bonan novaĵon, ke ŝiaj tiamaj aludoj ne restis en malbona tero. Kompreneble ŝi tre feliĉis. Ankaŭ mi parolis pri mia malkovro de tiu lingvo al sinjoro Jean-Thierry von Büren, kiun mi konis en la komerca lernejo de La Chaux-de-Fonds.

Mi membriĝis al **SES** kaj renkontis sinjoron Claude Gacond kaj liajn kunlaborantojn en **CDELI**. En oktobro 2004 mi eksekvis la perkorespondan kurson de esperanto kaj ekde 2005 mi partoprenas en kelkaj studsabatoj organizataj de CDELI. Ekde januaro 2005 mi estas membro de **UEA** kaj **ILEI**.

Mi ekkonis ankaŭ aliajn esperantistojn el diversaj landoj per la koresponda servo de la paĝaro **Edukado** :

www.edukado.net

En tiu movado mi trovis tion, kion mi serĉis longe sensukcese en diversaj lokaj grupoj aŭ asocioj : personojn, por kiuj respekto, paco kaj egaleco estas multvaloraj vortoj !

Ekde 1993 mi estas profesie sendependa memlerninta instruisto pri la germana kaj la franca. Hodiaŭ

mi profitas paroli pri esperanto ĉirkaŭ mi aŭ al miaj gestudentoj, ĉar mi opinias, ke ĝi povas helpi ilin en la lernado de aliaj naciaj lingvoj tiom, kiom en la hejma lingvo.

Mi serĉas ĉiam sur la reto « bonajn » paĝarojn en kaj pri esperanto.

Eble post kelkaj jardekoj mi renkontos ekslernant(in)on, kiu diros al mi: « *Bonan tagon, vi parolis al mi pri lingvo internacia, ĉu vi memoras? Kaj hodiaŭ mi lernas ĝin!* ».

Noto: Jean-Marc Leresche redaktis la ĉi-sekvan informadon pri “esperanto sur la reto”, kiun ni publikigas konklude al lia sinprezento: Ni esperas, ke ĝi utilis al multaj. Kaj en la venonta numero de *SES informas* malfermiĝos prireta rubriko prizorgota de Rolf Ernst, kiu certe malkovrigos al ĉiuj la trezoraron, kiu kaŝiĝas en la retaro.

Claude Gacond.



Malkovru esperanton sur la reto

La lingvo internacia estas tre ĉe-estanta interrete. Per la serĉilo *Google.com* mi trovis en januaro 2005 pli ol 3 milionojn da ligiloj.

Kompreneble en tiu ĝangalo ne estas facile trovi bonajn kaj interesajn informojn. Por helpi la gelernantojn en tiu esploro mi celas malkovrigi al ili la plej bonan lern-

ilon pri esperanto troveblan sur la reto:

www.lernu.net

La internacia teamo de *Lernu!* proponas senpagajn kursojn progresigajn, interesajn informojn pri la movado, intersanĝojn de mesaĝoj retroŝte kaj multajn ilojn por facile lerni la lingvon. La aliĝo senpaga estas nepre necesa por sekvi la diversajn kursojn.

La tutkomencantoj trovos du malsamajn lecionarojn: *Ana Pana* kaj *Vojaĝu kun Zam*. Poste la gelernantoj studos per *Ana renkontas*, *Jen nia IJK* kaj *Gerda malaperis*, la fama romaneto de Claude Piron. La frazoj estas aŭskulteblaj kaj la kursoj elŝuteblaj en formato PDF. (Por tio estas bezonata la programo *Acrobat Reader*.)

La kursoj proponas multajn ekzercojn por praktiki la malkovritajn temojn. Tre interesaj estas la korespondaj ekzercoj: la gelernantoj respondas tajpe al diversaj demandoj pri la leciono aŭ pli ĝenerale pri siaj okupoj; ili sendas siajn respondojn al helpanto, kiu parolas la saman gepatran lingvon kaj kiu korektos la respondojn, donante konsilojn aŭ interesajn komentojn, se vi havas problemon por traduki iun frazon, se vi ne certas pri konstruo de verboj, se vi bezonas kontrolon pri viaj

proponoj, ktp... Tiuj kursoj estas vere interaktivaj!

Senprobleme vi povas sendi demandojn al la helpanto de via elektita lingvo. La respondo venos baldaŭ kun komentoj.

Por progresi ni trovas vortarojn en diversaj naciaj lingvoj, kiuj ne nur tradukas la vortojn, sed ankaŭ montras la vortfaradon. Tiel ni komprenas multe pli bone, kiel funkcias la lingvo. Ni ankaŭ trovas etajn klarigojn pri la gramatiko ordigitajn laŭ temoj.

Alia interesa afero estas la interŝanĝo de mesaĝoj kun aliaj uzantoj (en komenco de februaro 2005 pli ol 12'000). Ni eĉ trovas ĉiutage la nomojn de la uzantoj, kiuj festas sian datrevenon. Ni povas tiel sendi mesaĝojn aŭ bildkarton por ekkoni novajn esperantistojn. Ni povas elekti la profilojn laŭ la lando, la aĝo, la lingvonivelo, la sekso (multaj metas sian foton). Ni rapide komprenas, ke esperanto estas vere supernacia lingvo. Dank'al ĝi ni ekkonas fremdajn kutimojn, renkontas virtuale interesajn personojn kun samaj ŝatokupoj aŭ interesoj.

Persone mi eklernis esperanton per tiu paĝaro. Post nur sesdeko da horoj mia nivelo estis jam "bona" aŭ eĉ "tre bona" laŭ la opinio de la aliaj esperantistoj.

Por komforte uzi la diversajn alternativojn konsilindas disponi je rapida konektilo al interreto.

Ankoraŭ mi vizitas regule tiun paĝaron kaj korespondas kun aliaj uzantoj, kiujn mi ekkonis antaŭ kelkaj monatoj.

La frapfrazo de *Lernu!* estas:

Ridetu kaj Lernu!

Do ne hezitu, provu!

Jean-Marc Leresche.

leresche.j.m@bluewin.ch

-oOo-

Reklamoj

Filmo pri la UK en Pekino

François Randin realigis filmon pri la UK en Pekino, kies titolo estas *LEKANTO AL PEKINO – la vojaĝo de Marguerite al la UK 2004*. Ĝi estas longdaŭra filmo (90 minutoj – 2 diskoj (DVD) – fr 50.- ambaŭ aŭ alia muntado mezdaŭra (55 minutoj – 1 disko (DVD) – Fr 40.- Ekzistas reduktita versio. Ambaŭ diskoj prunteblas ĉe CDELI.

Anonco pri la IKEK-Kongreso far Dieter Rooke

Mi ŝatus anonci la kongreson de IKEK (Internacia Kolektivo de Esperantaj Komunistoj) okazonta en Vilno, Litovio, ĵus antaŭ la Universala Kongreso. Ĝi komenciĝos je la 20-a de julio kaj daŭros ĝis la 23-a de julio. La aliĝo-kosto estas € 15 aŭ egalvaloro pagenda al mia adreso :

Dieter Rooke

Aüssere Klus 14, 4702 Oensingen.

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo

Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
Tel. : 032 967 68 55.

Fakso : 032 967 68 29, indiki : por CDELI.

Retadresoj : cdeli.vch@ne.ch

martine.schneller@ne.ch

claudio.gacond@ne.ch

nancy.fontannaz@ne.ch

monika.molnar@ne.ch

Restarto de la studsabatoj

En la nun pli granda, prestiĝa kaj bone reinstalita labor-salono de CDELI sukcesege restartis la prilingvaj kaj paroligaj didaktikaj studsabatoj ekde la novembra monato. Sametaĝe la disponeblo de du najbaraj lernejoj faciligas la organizadon de 3 paralelaj studgrupoj. Dum Nancy Fontannaz paroligas la tutkomencantojn per la afiŝaro de la *Enkonduka kurso de esperanto*, Monika Molnar vivoplene aktorigas la progresantojn, kaj Stefano Keller aŭ Claude Gacond zorgas pri la komencantoj. La novembra, januara, februara kaj marta renkontoj grupigis ĉiufoje pli ol dekkvino da lernemuloj venintaj trione el la neŭŝatela regiono kaj dutrione el tuta Romandio krom

Valezo. Kvankam Bern pli proksimas al La Chaux-de-Fonds, ol Lausanne kaj Fribourg, kaj Zürich kaj Basel ne pli foras, ol Genève, ĝis nun el Alemanio ege malofte venis studemuloj kaj esperanto-instruantoj celantaj didaktikan kleriĝon. Ĉu psikologia baro ankaŭ malfavoras la interlingvajn rilatojn eĉ inter la svisaj esperantistoj? Rezultas el tio, ke tutcerte la esperanto-praktiko vigliĝas en Romandio, pli ol en Alemanio. Espereble la lanĉo de kultura seminario okazonta la unuan sabaton de la monato ekde la venonta aŭtuno ankaŭ allogos alemanajn plikleriĝemulojn.

Dataro de la venontaj prilingvaj studsabatoj (okazantaj je la tria sabato de la monato): maje 21, junio 18, oktobre 22, novembre 19.

Dataro de la venontaj kulturaj seminarioj (okazantaj je la unua sabato de la monato): 2005 septembre 3, oktobre 1, novembre 5, decembre 3.

Horaro

9 h 30: Malfermo de la CDELI-salono kun eblo aĉeti librojn kaj babilo kafumante.

10 h 30: **Oficiala malfermo**, formiĝo de la studrondoj.

11 h 00: **1-a studperiodo.**

11 h 45: paŭzo.

12 h 00: **2-a studperiodo.**

12 h 45: Paŭzo por komuna tagmanĝo en najbara restoracio.

14 h 30: **3-a stud-periodo.**

15 h 15: teuma paŭzo.

15 h 30: **4-a stud-periodo.**

16 h 15: **Konkluda kunveno.**

16 h 30: Teumo, librovendado.

17 h 00: Oficiala fermo.

17 h 30: Fermo de la CDELI-salono.

Aliĝo: Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminariaj sabatoj ĉiu bonvolu nepre antaŭanonci sian partoprenon al Claude Gacond :

ĉu skribe : Claude Gacond, CDELI, Biblioteko de la Urbo, CP 3024, 2303 La Chaux-de-Fonds,

ĉu rete: claud.gacond@ne.ch

ĉu telefone: CDELI: 032 967 68 55, (hejme 032 926 52 32).

Partoprenkotizo: Por minimuma kovro de la elspezoj la partoprenkotizo estas po Fr. 15.- por partopreno (lernejano, studento, metilernanto senpage). Kiu ne antaŭanoncis sian partoprenon, tiu pagas pluse Fr 5.-.

KCE

Kultura Centro Esperantista

Strato Postiers 27, Poŝtfako 311

2301 La Chaux-de-Fonds

Tel. & Fakso : 032 926 74 07

kce.esperanto@bluewin.ch

Programo

Aprile 23-24: Enkonduko al lingva ekonomiko. Prelegos d-ro Michele Gazzola.

Maje 28-29: Festo okaze de la 15 jaroj de LF-koop.

Junie 24-29: Esti virino kaj verkisto en la nuna mondo – internacia du-lingva kolokvo franca-esperanta de PEN-klubo, kunlabore kun feminisma esperanta movado de KCE.

Julie 11-15: Naturamika Semajno en Grindelwald. Surloka gvidanto : Francisko Degoul.

26-31: Progresiga kaj perfektiga kursoj de esperanto.

Aŭguste 3-7 kaj 9-13: esperantologia fakultato, kun prof. Duncan Charters (didaktiko), Giorgio Silfer (literaturo / historio) kaj Usui Hiroyuki (interkulturaj demandoj).

Informinto: Dieter Rooke.

Svisa ILEI-sekcio

Mireille Grosjean, prezidanto, Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. : 032 932 18 88.

François Randin, kasisto, CP 246, 1000 Lausanne 22. Tel : 076 411 14 55.

Kunvoko de la membroj

Saluton !

Mi kunvokas la membrojn de Svisa ILEI-sekcio (SIS) en Zuriko la 16-an de aprilo samtempe kun la Ĝenerala Asembleo de SES, kiel kutime. Ne estas tagordo. Ni faros same kiel en Les Brenets pasintjare : komence de la asembleo de SES mallongan paroladon pri SIS.

Elkore kaj dankeme : Mireille Grosjean, prezidanto.

Kiel kasisto mi deziras ricevi de vi la pagon de via kotizo 2005 : Fr 30.- al la konto 23-20707-8 Svisa ILEI-Sekcio. Bonvolu seeble pagi per elektronika maniero ; la pago pergiĉeta multe kostas al ni.

Korajn salutojn : François Randin, kasisto.

UEA

François Randin, ĉefdelegito
kaj kotizperanto por Svislando.
Poŝtfako 246, 1000 Lausanne 22
esperanto@isuisse.com
Tel.: +41 76 411 14 55
Poŝtkonto 10-121498-1

Kelkaj atentigoj

La venonta 90-a Universala Kongreso okazos en Vilno (Litovio) inter la 23-a kaj la 30-a de julio. Mendu la aliĝilon al mi, se vi bezonas ĝin. Mi esperas ricevi ĝin kompletigitan de

vi tre rapide, tiel malpli kostos al vi la UK.

UEA-membroj: Daŭras ankoraŭ ĉijare la kampanjo propaganda. Parolu al viaj amikoj pri UEA. Kiuj trovas la informilon *UEA estas via asocio* aldone al *SES informas*, tiuj ne hezitu kreskigi la nombron de la UEA-anoj en Svislando.

Membro-markfolio: Ĉar ne ĉiu membro bezonas membro-markfolion, ni ne sendos ilin aŭtomate. Se vi bezonas ĝin, kontaktu min.

Francisko Randin.

-oOo-



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel
PF 103, 4005 Basel, Tel.: 0049 76 214 57 12
Kunvenoj : 20 h 00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Kunvenoj

Aprile 15-17: Regiona staĝo en Lucelle organizita de Mulhouse-Esperanto.

Aprile 28: Surprizo.

Maje 26: Ĉe Berthe Spalinger.

Junie 23: Minigolfo en Grün 80.

Aŭguste 21: Vizito de la vin-muzeo en Tegerfelden.

Septembre 22: Invito ĉe Nicole Bérout-Focke.

Oktobre 27: Ĉiu rakontu pri siaj ferioj.

Novembre 24: Programo 2005.

Decembre 10: Zamenhofa festo kaj cent-jariĝo de ESB. Ni invitas jam nun aliajn grupojn festi kun ni.

-oOo-

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

Esperanto-infos : Tel. : 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20 h 00 en la restoracio «*Aux Cheminots*», Rue des Gares 7, Genève. Komuna vespermanĝo ekde la 19-a horo.

Venonta kunveno

Aprile 5. Anita Altherr prezentos lumbildojn pri la historio de La Stelo kaj pri malnovaj stel-anoj. Manĝo je la 19 h 00.

Memore al

Madeleine Stakian-Vuille

aŭ Mad Mevo (1910-2004)

La unua numero de la jaro 2005 de *Brasikfolio* estis plene dediĉita al Madeleine Stakian-Vuille (Mad Mevo), kun kontribuoj de Claude Piron, Andres Bickel, Andy Künzli, Ernst Glättli, Anita Altherr, Raymond Zoller, David Buhlmann, Eva Vischer kaj Joĉjo Tomaszczyk. Citaĵoj el tiu grava dokumento aperos en la nekrologo, kiun publikigos *SES informas* memore al Mad Mevo en la venonta numero 2005-2 (aprilo-majo).

Laŭ la volo de nia poetino kaj de ŝiaj filinoj, la libroj, dokumentoj kaj manuskriptoj, kiujn ŝi heredigis al CDELI, kun erara mencio de KCE en testamento, fine pliriĉigos la kolektojn de CDELI, kaj la duoblaĵoj estos proponitaj al KCE.

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale 389, 1009 PULLY

Tel: 021 729 58 02

<esperanto@isuisse.com>

<http://www.esperanto.ch>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20 h 00.

Kunvenoj

Aprilo 4: François Randin, gramatik-rondo pri afiksoj

Maje 2: Vahid, juna irana esperant-isto parolos pri sia lando.

Junie ?: Dato fiksota. Ekskurso.

Septembre 5: Temo anoncota.

Oktobre 3: Temo anoncota

Novembre 7: Temo anoncota.

-oOo-

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj:

Hotelo Steghof, Voltastrasse 2, atingebla de la stacidomo per la trolebusoj 4 kaj 5.

Hotelo Waldstätterhof, Zentralstrasse 4 (proksime de la stacidomo). Tel. 041 2 271 271.

Gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel.: 041 210 25 88.

Kunvenoj

Aprile 6: Ĉe ges-roj Anna & Koni Rey: 14h00: Paroliga leciono kun Franz Brügger, 14h30: Ankoraŭ pli da historio pri Lucerno kun Annelies Dettling.

Maje 4: Waldstätterhof: 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Franz Brügger.

